AKTUALAJ INFORMOJ DE JURBARKAS'AJ GEESPERANTISTOJ

# HORIZONTO

Jurbarko esperantininkų informacinis leidinys

NUMERO 2(21) (II-A KVARONO) 2017

## SALUTOJ, BONDEZIROJ

Intertempe 04.01-06.30 klubanoj festis naskiĝtagojn: estimataj sinjorinoj Laimutė Ašmonaitienė (04.05), Roma Zubavičienė (05.02)



Ni ĉiujn gratulas kaj deziras al Vi sanon, sukceson kaj ĝojon!

**Geklubanoj de Esperanto klubo**

## INFORMOJ

La 12-an de majo okazis vica kluba kunveno. Partoprenis 6 anoj. Stanislovas Raulynaitis prezentis novan numeron de revueto „Horizonto", konatigis pri Esperanto novaĵoj el Esperanto revuoj, reto. Klubanoj rakontis pri propraj novaĵoj. Ankaŭ oni pridiskutis artikolon pri nia esperantistino Zofija Babonienė en distrikta gazeto „Nia tempo". Irena Viliušienė informis pri ricevita financa subteno – 400 Eŭroj.

Juozas Minikevičius



**Sur la foto esperantistoj dum kluba kunveno**

## Grava novaĵo

Jurbarkasa Esperanto klubo „Horizonto" partoprenis en la anoncita konkurso de la administracio de Jurbarkasa distrikto por ricevi financan subtenon al neregistaraj organizaĵoj. Esperanto klubo „Horizonto" preparis projekton „Kunlaboru kun geamikoj" kaj petis subteni en organizado de ekskurso al latva ĉefurbo Riga kaj renkontiĝo kun Rigaj geesperantistoj. Ni komence de majo eksciis, ke oni subtenis nin per 400 eŭroj. La ekskurson ni planas en komenco de aŭgusto. Kune ekskursi ni invitis estintan jurbarkanon esperantiston Česlovas Žukauskas el Šiauliai.

Stanislovas Raulynaitis

## Niaj esperantistoj.
## Giedraitytė Nijolė

Malsupre foto el Esperanto tendaro en Vytėnai, maldekstre Nijolė Giedraitytė.




Nijolė Giedraitytė , Jono naskiĝis la 23-an de julio 1955 en Rotuliai, distrikto Jurbarkas. Ŝi lernis en la I-a mezlernejo de Jurbarkas kaj sukcese finis ĝin. Poste Nijolė studis en Vilnius, en la Pedagogia Instituto ( nun Edukologia Universitato) rusan lingvon kaj literaturon . La studadon en Instituto ŝi sukcese finis kaj akiris specialecon de instruistino pri rusa lingvo kaj literaturo. Ŝi eklaboris en la mezgrada lernejo de Girdžiai kiel instruistino. Pri Esperanto Nijolė eksciis legante distriktan gazeton „Šviesa". Ŝi aliĝis al lingvokurso , kiun organizis Esperanto rondeto en la distrikta biblioteko de Jurbarkas. Esperanto kurso komenciĝis la 10-an de oktobro 1979 kaj finiĝis la 24-an de majo 1980. Ŝi trapasis tutan lingvokurson kaj sukcese ekzameniĝis. Kurson gvidis L.Abromas. Post lingvokurso ŝi aliĝis al Esperanto rondeto kaj aktive partoprenis en ĝia laboro. Ŝi partoprenis esperantistajn aranĝojn en Giruliai, en Vytėnai kaj aliajn. Nijolė estis vicprezidantino de Esperanto rondeto en Jurbarkas, multe legis E- periodaĵojn kaj librojn, interkorespondadis kun eksterlandaj leterami koj. En 1980 – 1981 lernojaro Nijolė gvidis Esperanto rondeton en mezlernejo de Girdžiai. En tiu rondeto fakultative internacian lingvon lernis deko da gelernantoj 17-jaraĝaj. Du lernantinoj de tiu rondeto sukcese trapasis ekzamenon kune kun la finintoj de la Esperanto kurso ĉe kulturpalaco de Jurbarkas la 6-an de junio 1981. Tamen post la sukcesa komenco , Nijolė ne plu aktivis en kluba laboro.

L. Abromas

## Kutkevičienė Danguolė



Sur la foto..D.Kutkevičienė kvina de maldekstre

Danguolė Kutkevičienė estis instruistino de germana lingvo en la I-a mezlernejo de Jurbarkas. Pri Esperanto ŝi eksciis legante distriktan gazeton „Šviesa" en 1971. Internacian lingvon Danguolė lernis en intensiva lingvokurso de 4 ĝis 9 de januaro de 1972, kiun gvidis A.Mekys el Vilnius , tiutempe oficvojaĝe restinta en Jurbarkas. Tiu lingvokurso daŭris tutan semajnon po du horoj ĉiutage kaj okazis en legejo de distrikta biblioteko. Post la fino de tiu kurso, estis elektita estraro, por gvidi kaj organizi Esperanto movadon en Jurbarkas. En tiun estraron estis elektita ankaŭ D.Kutkevičienė. En oktobro de 1972 estis organizita praktika Esperanto kurso en legejo de distrikta biblioteko, kiun gvidis Danguolė. Post la kurso la 17-an de majo 1973 okazis ekzameno ,kiun sukcese trapasis 11 kursfinintoj.. En 1972- 1973 lernojaro D.Kutkevičienė gvidis Esperanto rondeton en unua mezlernejo de Jurbarkas, kie fakultative internacian lingvon lernis deko da gelernantoj.

En marto de 1973 D.Kutkevičienė kun grupo da gelernantoj – esperantistoj partoprenis en Pasvalys la 10-jaran jubileon de Esperanto rondeto en okjara lernejo kaj 70- jariĝon de konata mondvojaĝanto esperantisto A.Poška , organizita de Br.Aukštikalnienė. Fare de komunista partio ekde oktobro de 1973 aperis en Litovio kondiĉoj malfavoraj por Esperanto. Ekde tiam estis malpermesite instrui Esperanton en lernejoj kaj Esperanto movado ĝenerale subpremata. Tial geesperantistoj de Jurbarkas provizore eksilentis.

L.Abromas

Informilon preparas redakcia komisiono.



Pro enhavo de artikoloj respondecas mem subskribintoj

## Honorigitaj jurbarkaninoj



**Sur la foto de maldekstre esperantistino Laimutė Ašmonaitienė, Zita Sorokienė kaj Skirmantas Mockevičius, urbestro de Jurbarkas**

La 16-an de februaro , tagon de refondo de Litova ŝtato ,la urbestro de Jurbarkas Skirmantas Mockevičius salutis jurbarkanojn okaze de la festo. „Ni memoru , kiom gravas al ni la tero, kiu nin portadas, la hejmo en kiu ni kreskis, kiom gravas la radikoj de nia nacio, geavoj, gepatroj, praavoj. Tio, kiel ni mem respondos, je kiom gravas al ni litova kulturo , lingvo , estos la senco de tiu ĉi festo“, - diris urbestro.

Okaze de granda festo urbestro S.Mockevičius al entreprenistino , membro de la konsilio de distrikta administracio Zita Sorokienė kaj al popolartistino , aktorino de K.Glinskis teatro Laimutė Ašmonaitienė transdonis signojn de la distrikta administracio „Pro la merito al regiono Jurbarkas.“

La reĝisorino de popolteatro Danutė Budrytė – Samienė diris, ke Laimutė kiel aktorino estas tre kuraĝa , universala, verkas diversplanajn rolojn kaj scenografion. „Laimutė estas ege akurata, sanulino, vojaĝanto , scivolema. Tiaj diversflankaj homoj malmultas. Ŝi estas ekzemplo de la homo , kiu , atinginta tiom honoran aĝon , ne lamentas pro la maljuneco, sed vivas en verkado kaj serĉado“ , -diris reĝisorino.

Vere ŝi multon scipovas, plej bone – pentri kaj aktori. Du pasioj , sen kiuj , ŝi diras , ne imagas sian vivon. Ekde 1984 en teatro ludanta aktorino verkis multajn memorfiksajn rolojn kaj la kvanton de ekspozicioj de siaj pentraĵoj perdis ĉe naŭ dekoj. Pasintjare honoran jubileon festinta artistino estas plej vera jurbarkanino. Laimutė komencis pentri akvarele en lernejo, Ŝi volis studi belarton, sed Vilno ege malproksimis. Ne kuraĝis ŝi. Tial ŝi elektis medicinistajn studojn en Kaunas , post kiuj revenis al Jurbarkas kaj laŭ specialeco laboris dum 33 jaroj. La belarto ĉiam apudis . Laimutė per seka akvarelo pentris pejzaĝojn , mutnaturojn. Ŝi pentras en naturo kaj hejme. En 1982 Laimutė aliĝis la Unuiĝon de popolartistoj.

Aktori Laimutė komencis en infanaĝo , ŝi prezentis surkortajn spektaklojn, aktoris en lernejo. En malsanulejo ŝi fondis medicinistan teatron. Poste ŝin invitis aktori en la teatro de kulturdomo, sub la gvido de A.Pauliukaitis. „Mi pretis la scenejon balai, gravis trafi en teatron ?“ - ridas aktorino. La kvanton de roloj ne memorante aktorino diras, ke sur scenejo ŝi ne timas esti malbela, ŝi ne bezonas rolojn de princiinoj. „Sur scenejo estas ne mi.Tie estas personaĵo. Tie mi vivas alian vivon „, - per brilantaj okuloj pri la plenumitaj roloj rakontas Laimutė , ne ektiminta la aspekton de sendenta judino Aŝkenazi en spektaklo „... ili forlasis min“ . En la teatro Laimutė aktoras ĝis nun.

Apud aktorado kaj pentrado en ŝia vivo abundas interesaj okupoj : iam ŝi lernis kaj sufiĉe bone posedis internacian lingvon Esperanton. Ŝi estas membro de la Esperanto klubo „Horizonto“ en Jurbarkas kaj aktive partoprenas kluban laboron. Laimutė korespondadis kun eksterlandaj esperantistoj , kaj vizitis kelkajn el ili en ilia hejmo. En daŭro de naŭ jaroj neglektante la veteron kaj jarsezonojn , ĉiun duan tagon ŝi banis sin en lago. Dum tri jaroj ŝi studas en la Universitato de Tria Aĝo- turismon, geografion kaj anglan lingvon. (Senfine mi ŝatas vojaĝi, vizitis jam multajn landojn, sed mi dezirus viziti pli multe“) , ilustris 15 librojn, ŝatas ĝardenumi,brodi.

Ĉu oni povas dubi pri ŝiaj meritoj al regiono de Jurbarkas? Certe ne! Al tio Laimutė respondis : „Mi tiel vivas ? Kaj ĉio“.

L. Abromas

Informilon preparas redakcia komisiono.



Pro enhavo de artikoloj respondecas mem subskribintoj

## Vojaĝoj

De la 27-de majo ĝis la 6-a de junio mi estis en la Granda Britujo. Dum restado en la Granda Britujo mi vizitis urbon Kembriĝo. Tie konatiĝis kun urba historio, vizitis universitaton.

Ankaŭ ripozis apud maro, promenadis en Ipswich , naskiĝurbo de mia amata nepino Austina. Fotoj pri mia vojaĝo malsupre.

Stanislovas Raulynaitis



**Universitato en Kembriĝo**



**Universitato en Kembriĝo**




**Simbolo de Granda Britujo**



**Apud maro**



**Kun nepino Austina**

Informilon preparas redakcia komisiono.




Pro enhavo de artikoloj respondecas mem subskribintoj



**Apudmara urbeto**



**En la urbo Ipswich**



**En la urbo Ipswich**

## Nida - Juodkrantė

Mia hobio estas vojaĝoj. Mi ĉiun monaton ien vojaĝas. En la junio mi vizitis ripozurbojn Nida kaj Juodkrantė. Malsupre kelkaj fotoj el Nida kaj Juodkrantė. Mi navigis per ŝipo. Mi rekomendas viziti Nida, Judkrantė, ĉar estas multo por ekvidi. Malsupre fotoj el vojaĝo.

Stanislovas Raulynaitis



**Mi en la Ŝiphaveno de Nida**

Informilon preparas redakcia komisiono.



Pro enhavo de artikoloj respondecas mem subskribintoj




Ekkona pado de Parnidis - duno




Hotelo Ąžuolynas (ĉi tie ni ripozis)




Judkrantė, monto de sorĉistinoj

**Redaktoro: Stanislovas Raulynaitis**
**Korektadon okazigis L.Abromas**
**Kontaktoj: klubas.horizontas@gmail.com**
**Tel. Nr. 8-620 21024**

Informilon preparas redakcia komisiono.



Pro enhavo de artikoloj respondecas mem subskribintoj